

# Alispeca vojaĝo en Israelo

En la februara n-ro de la prestiĝa kultura kaj mondvojaĝa magazino *Masa Ahher* (hebree "Alispeca vojaĝo"), aperis 5-paĝa, tre favora artikolo pri Esperanto el la plumo de israela ĵurnalisto loĝanta en Svedio.

La artikolo estas riĉe ilustrita, i.a. per fotoj de la UK-oj en Havano kaj Bjalistoko. Aldone al abundo da faktoj pri la lingvo, ĝi intervjuas esperantistojn el Svedio, Kanado, Israelo kaj Aŭstralio.

La artikolo konstatas ke "Esperanto ekzistas pli ol cent jarojn kaj ĝi daŭre evoluas. Ĝiaj parolantoj estas disigitaj en ĉiuj anguloj de la terglobo, ili estas ege aktivaj kaj produktas gazetojn, muzikon kaj teatraĵojn. Ili havas naciajn kaj

internaciajn organizaĵojn kaj ili renkontiĝas en sennombraj renkontiĝoj tutmonde".

Ĝia konkluda alineo diras: "Esperanto estas kiel lingva manpremo: du personoj etendas siajn manojn je duono de la distanco inter si, farante egalan penon kompreni unu la alian. Esence Esperanto estas reala ilo por egaleco kaj konekzisto, precize kiel Zamenhof mem priskribis la unuan E-kongreson: "ne renkontiĝis ĉi tie francoj kun angloj, rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj".

La artikolo aperis en bona koincido kun la baldaŭa Internacia Libro-foiro de Jerusalemo (20-25.2), kie ELI havos budon pri E-libroj kaj muziko, kaj prezentos i.a. la novan duoblan KD-on de ELI *Kanti gefratoj kune*.

**Amri Wandel**, Prezidanto de ELI

